Mº 02 - FEV / 83

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República 54-29 andar - 20.211 - Rio de Janeiro-RJ BRASIL

500 4 500 446	

IMPRESSO

KOTIZTABELO UEA / 83 ANKORAŬ VALIDAS

Plezure ni ricevis el la C.O. de UEA la jenan klarigon: "Ni informas vin , ke estas decidite lasi la kotizojn por UEA je la nuna nivelo ankoraŭ ĝis almenaŭ la 31 a de marto 1983. Antaŭ tiam ni denove studos, ĉu necesos altigi la kotizon. (a) S. MacGill, dir. C.O. ".

Do , la tabelo diskonigita pere de nia blua cirkulero, datita de 82.12.07, ankaŭ restas senŝanĝa.

MONSENDO EKSTERLANDEN

Plie klarigante niajn kialojn en la postulo de aldonaj 25% por kotizpagoj kaj abonoj sendotaj eksterlanden, ni informas al vi , ke :

a) monsendo per banko postulas grandan krompagon, kaj sendo de interna - ciaj respondkuponoj, almenau rilate al UEA, estas nuntempe malavantaĵa por ni, jene:

Tiel la malprofito = 30,66 % !
b) monsendo interne de letero (kiu cetere postulas aĉeton en la paralela merkato) estas ne nur kontraŭleĝa , sed ankaŭ kontraŭ la interesoj de la tu ta evoluanta mondo , kiu bankrotos , se tio fariĝos la ĝenerala regulo .

AFIŜO-DISKO-KURSO " KIO ESTAS ESPERANTO ? "

La 23 an de la kuranta monato, je la 5 a p.t.m., ĉe la librejo J. CARNEIRO FELIPE (PRAIA DE BOTAFOGO, 188, RIO DE JANEIRO - RJ), nia senlaca samideano SYLLA CHAVES oficiale lanĉos sian novan, sed ne lastan, verkon titolitan " KIO ESTAS ESPERANTO? ". Jen kelkaj informoj, kiujn la aŭtoro redaktis pri tiu nepre aĉetinda eldonaĵo:

"En nia opinio, ĉi tiu materialo estas modernigita versio de la ŜLOSILO DE ESPERANTO. Per ĝi oni havas rapidan prezentadon de la lingvo kaj de la ĉefaj faktoj pri ĝia uzado en la nuntempa mondo. Kaj estas tri gravaj plibonigoj:

- 1. BILDOJ, kiuj, pli ol vortoj, pruvas, ke Esperanto estas nuntempe tre uzata;
- 2. DISKO, per kiu oni pli facile kaj agrable lernas Esperantan prononcadon; 3. AFIŜEBLECO (en universitatoj, kluboj, bibliotekoj, ktp.). Eble per ĉi tiu moderna materialo nia movado trafos novajn Tolstojojn, kiuj

lernos nian lingvon en du horoj.

Se eksterlanda aŭ internacia organizaĵo volas adapti ĉi tiun materialon por alilingva uzado, la aŭtoro pretas helpi ĝin tiucele. Oni povos interkonsenti pri la uzado de la sama disko kaj de kelkaj el la

bildoj . "

ENKONDUKO DE ESPERANTO EN SCIENCAJN MEDIOJN

La Instituto pri Kibernetiko el la Universitato de Paderborn, Germanio, vi - gle agas por enkonduko de la Internacia Lingvo en sciencajn mediojn. Ni, antaŭnelonge ricevis liston da interesaj publikaĵoj en Esperanto kaj naciaj lingvoj, interalie: revuo HUMANKYBERNETIK, libroj KLERIGO KAJ PRIKALKULADO, ENKONDUKO EN LA INTERLINGVISTIKON, kaj tre interesa plurlingva kalendaro, taŭ ga por donacoj. Informoj petu al: D-ro Helmar Frank, Pohlweg 55 / Pf 1621. D-4790. Paderborn, Germanio.

MENCIINDAJ VIZITOJ

Meze de Januaro, dum lia restado en Salvador-BA, Prezidanto de BEL vizitis BAHIA ESPERANTO-ASOCIO, ESPERANTA STUDGRUPO ZAMENHOF kaj nian estimatan konsilanton LEOPOLDO KNOEDT. Ni estas konvinkitaj, ke tiuj kontaktoj estis vere fruktodonaj por la movado.

Aliflanke, komence de ĉi tiu monato, BEL ricevis la agrablajn vizitojn de membroj de la GAUĈAJ STEPOJ GRUPO, el Porto Alegre - RS kaj de la simpatia samideano OSVALDO PABLO LEÓN, Prezidanto de ARGENTEJO (Argentina Esperantista Junulara Organizo) kaj estrarano de Bonaera Esperanto-Asocio.

NOVAĴOJ EN LA LIBROSERVO DE BEL

- * ALMANAKO LORENZ / 1983, Rio de Janeiro, Spirita Societo F. V. Lorenz, 1983, 210 p., 6 900,00.

 "Ĝi pritraktas ĉiujn temojn, kiuj interesas la modernan homon lau la spirita vidpunkto, kaj ĝi ampleksas vastan kampon de la filozofio, de la scienco kaj de la kulturo."
- DICIONÁRIO ESPERANTO-PORTUGUÊS, Ismael Gomes Braga, Rio de Janeiro, Federação Espírita Brasileira, 4a eldono, 1982, 160 p., 68 640,00.
 Reeldono de la famkonata vortaro de Ismael, eldonita de FEB.
- * KIO ESTAS ESPERANTO?, Sylla Chaves, Rio de Janeiro, kuneldonis BEL kaj Fondaĵo Getulio Vargas, 1983, afiŝo kurso disko. Afiŝo-kurso sen disko: \$500,00. Afiŝo-kurso kun disko: \$500,00.

 " Modernigita versio de la ŜLOSILO DE ESPERANTO, tauga por la disvastigo de Esperanto."
- * KRESTOMATIO DE ESPERANTA LITERATURO , Tekstoj , dataro , bibliografio , Vol.II, Szerdahelyi István , Budapest , Tankonyvkiado, 1981 , 325 p. , 6 2.300,00. "La dua volumo sekvas la metodon de la unua , daurigante teritorie per Hungario , Austrio , Germanio kaj Nord-Europo , vojo pli-malpli ankaŭ kronologia."
- * LA PERDITA HONORO DE IU KATARINO BLUM', Heinrich Böll, Stuttgart, Bleicher Verlags -KG, 1978, 154 p., 6 1.750,00.

 "Esperanta traduko de Rikardo Sulco de la fama verko de nobelpremiito Hein rich Böll."
- * LA PERDITA VIZAĜO, Josel Nesvadba, Prago, Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1974, 111P., 6\$ 500,00.

 "Nesvadba esprimas en sia verkaro la kredon pri nerefutebleco de la fundamentaj homaj valoraĵoj, pri la homa kapablo influi sian propran sorton kaj tiun de la estonta mondo."
- * PLENA ILUSTRITA VORTARO, G. Waringhien kaj aliaj, Parizo, SAT, 1981,1304 p,, 61 13.000,00.
 " La plej autoritata kaj ampleksa vortaro de la internacia lingvo".
- * PLENA VORTARO DE ESPERANTO KUN SUPLEMENTO, G. Waringhien kaj aliaj, Paris, SAT, 1980, 9a eldono, 511 p. + 63 p., 6 2.500,00.

 "La patro de Plena Ilustrita Vortaro, preskaŭ poŝformata, kun difinoj en

Esperanto, por ĝenerala uzo ".